

Praga skolo

En la pionira tempo de Esperanto ŝovis la lingvon antaŭen svisa matematikisto *René de Saussure* (1868-1943) precipe per sia regulo de **neceso kaj sufiĉo**, laŭ kiu oni ne uzu pli da prefiksoj kaj sufiksoj ol estas necese (ekz. *laboremo* anstataŭ *laboremeco*). Lia pli aĝa frato *Ferdinand de Saussure* (1857-1913) estas konsiderata kiel patro de moderna lingvistiko, ĉar en sia *Kurso de Ĝenerala Lingvistiko* li venis kun multaj novaj ideoj. Inter la du mondmilitoj estis en Eŭropo du ĉefaj lingvistikaj centroj, nome *Kopenhaga skolo* kaj *Praga lingvistika cirklo*, kiu klopodis disvolvi la ideojn de Ferdinand de Saussure. Ĉefaj personoj estis Vilém Mathesius, Bohuslav Havránek, Jan Mukařovský kaj rusaj elmigrintoj Roman Jakobson kaj Nikolaj Trubeckoj. La cirklo ekzistas ĝis nun kaj nia Josef Rumler sentis sin ĝia membro.

Ankaŭ interne de la Esperanto-movado estiĝis pluraj literaturaj centroj, ekz. Budapeŝta skolo (Kalocsay, Baghy), Skota skolo (Auld, Francis, Dinwoodie), Iltis-skolo (Hauptenthal, De Diego, Karel Pič), Analiza skolo (Rikardo Ŝulco, Vilhelmo Lutermano) k.a.

Niaj poetoj Josef Rumler (1922-1999), Eli Urbanová (1922-2012), Jiří Karen (1920-2000) kaj Čestmír Vidman (1921-2013) daŭrigis la tradicion kaj nomis sin Praga skolo. En la jaro 1985 ili prezentis sin en broŝureto Kvarfolio, kiun ili eldonis kiel literaturan suplementon de la gazeto Paco.



Eli Urbanová (1922-2012)

Sur la titolpaĝo ni vidas poetinon Eli Urbanová, pri kiu jam prelegis ĉi tie Petro Chrdle. Ŝi eklernis Esperanton kiel 27-jara en 1949 kaj jam post du jaroj ŝi unuafoje akiris premion en Belartaj Konkursoj de UEA.

Ni memorigu ŝiajn plej gravajn poemkolektojn:


*** Nur tri kolorojn * El subaj fontoj * Verso kaj larmo * Vino, viroj kaj kanto * Peza vino / Těžké víno * El mia buduaro * Rapide pasis la temp' * Prefere ne tro rigardi retro**

Sed eble plej grandan popularecon atingis al ŝi aŭtobiografia romano **Hetajro dancas**.




Josef Rumler (1920-1999)

Dua plej aktiva membro estis Josef Rumler, konata ankaŭ en la ĉeĥlingva literaturo kiel lirika poeto de ĉeĥa pejzaĝo kaj hejmo, tradukanto el la pola kaj redaktoro de klasikuloj. Li mem esperantigis siajn poemarojn **Matena melkado** kaj **Renovigitaj bildoj de la kamparana vivado en Ĉeĥio** kaj verkis originalan poemon **La lasta ĉevalo** vekanta impreson de galopanta ĉevalo. Li ankaŭ esperantigis poemojn de multaj ĉeĥaj poetoj en broŝuro **52 nuntempaj ĉeĥaj poetoj en 1000 versoj** kaj unuopajn en la brazila gazeto *Fonte*.




Jiří Karen (1920-2000)

propranome Ladislav Podmele, estas konata kiel ĉeĥlingva poeto de dudeko da poemaroj (li eĉ havas en Prago *Parkon Jiří Karen*). Li okupiĝis komence pri aliaj lingvoprojektoj, eĉ pri la interslavaj, kaj ĉirkaŭ la jaro 1980 li dediĉis sin al Esperanto. Tiujare li eĉ gajnis duan premion en Belartaj Konkursoj de UEA per poemaro **Eternaj revuloj**. Nelonge antaŭ la forpaso li samizdate eldonis kolekton **Kantoj de vaganto sur planedo Ĝoja Ĝojmalo**. Li ankaŭ esperantigis historian biografian romanon de František Kožík **La plej eminenta el pierotoj** pri la franca mimo Gaspard Debureau kaj rakontojn de Ota Dub, Jaroslav Čejka kaj Miloš Jariš aperintaj en Paco. Grandan elekton el lia propra poezio faris kaj esperantigis Jiří Kořínek kaj eldonigis ĉe Fonto sub titolo **Flugilhava ŝtono**. En manuskripto restis **Serĉado de blua tono** pri Frederiko Chopin (esperantigis ankaŭ Kořínek).



Čestmír Vidman (1921-2013)

estas en la *Kvarfolio* reprezentita per **Japanaj motivoj**, sed li verkis precipe ĉeĥe kaj kun Esperanto nur simpatiis, kvankam en la broŝuro Josef Rumler asertas, ke Čestmír Vidman preparas specialan sinoniman vortaron de Esperanto, sed tiu neniam aperis. Liajn poemarojn **Kun pilgrimbastono**, **Dek sep silaboj** kaj **Karesa fantazio** esperantigis Jaroslav Krolupper.



František Kožík (1909-1997)

Sian patronon ili vidis en František Kožík, verkisto de biografiaj romanoj (Debureau, Cervantes, Camoes, de Sade, Zátopek, Janáček, Mánes, Čermák, Těsnohlídek k.a.). Inter la du mondmilitoj li laboris en Radiojournal Brno, ĝia esperantlingva Verda Stacio, kiel la plej sukcesa verko estis opereto Sur rozoj sternite (verkita kun Bohumil Polách). Jiří Karen preparis kun Josef Vondroušek broŝuron de fragmentoj el liaj romanoj **Poeto ne mortas** (la titolon havas romano pri Camoes).

Ili klopodis altiri ankaŭ Karolon Piĉ (1920-1995), sed tiu de ili distanciĝis. Malgraŭ tio ili estis fascinitaj de liaj neologismaj eksperimentoj, precipe en *Litomiŝla tombejo*, kaj deziris disvolvi la lingvon en simila direkto. Josef Rumler verkis eseon *Abunde kaj redunde*, kiu fariĝis kvazaŭ ilia manifesto.

La vorto *redunda* signifas pluroblan ripetigon, por sekurigi informon kontraŭ perdiĝo kaj misfunkcio. Ekzemple en la frazoj *nia granda fabriko - niaj grandaj fabrikoj* trifoje oni aŭdas singularon kaj trifoje pluralon, do oni estas trifoje certigita, ĉu temas pri unu aŭ pluraj fabrikoj. La vorto **redunda** signifas **superflua**, sed utile superflua.

Rumler klarigas, ke dum faka lingvo bezonas por ĉiu nocio nur unu terminon (sinonimoj estas malutilaj), la beletra lingvo male sopiras multajn sinonimojn por riĉa kaj nuancita esprimado. La eseo poste aperis ankaŭ ĉe la eldonejo Stafeto sur Kanariaj Insuloj, sed sub alia titolo *Koncepto de diversaj stiloj kaj ĝia apliko al la Esperanta leksiko* kaj vekis akran polemikon. Ordinaraĵoj esperantistoj volas havi simplan Esperanton, precipe niaj propagandistoj, kaj riproĉas verkistojn, ke ili komplikigas la lingvon. Ceteraj verkistoj ankaŭ volas havi riĉan Esperanton, ĉar malriĉan lingvon la homaro ne adoptos por seriozaj aferoj, sed volas ĝin riĉigi alimaniere. Aperis broŝuro *Debato pri la "Praga skolo"*, kie esprimis sin pri la problemoj verkistoj kiel Perla Martinelli, Gaston Waringhien, Bernard Golden, Reto Rossetti, Claude Piron kaj aliaj. Plejparte rifuze, eĉ nomante neologismojn **egologismoj**, ĉar praganoj per novismoj volas elstarigi siajn egojn.

Necesas rememori, ke la neologisma problemoj ne estas novaĵo. Jam Baghy kaj Kalocsay polemikis, Kalocsay enkondukadis novajn esprimojn, Baghy estis kontraŭ. Baghy verkis nur originale kaj povis simple eviti malfacilajn nociojn, dum Kalocsay tradukadis ĉefverkojn kaj sentis mankon de ekvivalentoj en Esperanto, ĉar tradukanto ne povas ellasi vorton nur pro tio, ke li estas en embarasoj, kiel ĝin traduki. Baghy sarkasmis per teksto konsistanta nur el neologismoj, Kalocsay respondis per teksto konsistanta nur el mal-vortoj.

Ivo Rotkviĉ en sia traduko de historia romano *Cezaro* de Mirko Jeluŝiĉ montris, ke tradukantoj nesufiĉe profitas la derivan sistemon de Esperanto. Li uzis nenium neologismon, sed multajn surprizajn derivaĵojn kaj aplikojn (ekz. *kuleri supon, flugilantaj anseroj, afiŝi ironian rideton* k.s.). Ankaŭ Claude Piron en sia libro *La bona lingvo* prezentas, kiom da ebloj Esperanto donas anstataŭ neologismoj (ekz. *alsupri/desupri* por eviti neologismojn *ascendi/descendi*).

En la jaro 1949 preparis la 29-jara Karolo Piĉ sciencan prelegon pri neologismoj por la Kolegio en Doksy. La prelego poste aperis en la gazeto Esperantista en du numeroj 8 kaj 9 (ĉar tro longa). Karolo Piĉ tie asertas, ke enkondukado de novaj vortoj estas necesa, sed oni tion devas fari modere, ne sovaĝe, ne inunde kaj kritikis pro tio Kalocsayon. Ankaŭ lian Plenan Gramatikon, kiu faras Esperanton komplika.

Sed dudek jarojn poste li ŝanĝis sian opinion kaj komencis inundi la lingvon per neologismoj ankoraŭ multe pli ol Kalocsay. Ŝanceliĝantan koncepton li montras ankaŭ rilate al *Abunde kaj redunde*. Laŭ Eli Urbanová li skribis al Josef Rumler jenan leteron:

*Estimata samideano, dankon por la **Matena melkado**. En viaj poemoj esperanto trovas novan dimension kaj ian novan vivecon. Tio cetere validas eĉ pri via **Abunde kaj redunde**, kiun mi legis kun granda ĝuo. Abunde kaj redunde estas ja ĉiutaga vivo kaj praktiko de ĉiu kultura lingvo.*

Sed en sia **Urbi et orbi** li skribas:

*Tamen mi volus rebonigi kelkajn misinformojn, kiuj troviĝas en la artikolo "Lingva praktiko kaj la beletra evolucio". Ĝia aŭtoro Giorgio Silfer parolas tie pri ia "cirkvito de Karolo Piĉ", cirkvito, pri kiu mi mem ne scias ion. Due, kaj ĉefe, li daŭre min kalkulas al la Praga skolo, al kiu mi **neniam** apartenis. **Abunde kaj redunde** estas elkhude nur persona verko de Rumler mem. ... Kaj nokfoje mi insistas: mi **ne** estas pragano; nek literature, nek geografie, sed ja Iltis-skolano kaj litomiŝlano!*

Kaj poste li daŭrigas:

*Mi ne scias, por kiu verkas la Praga skolo. Mi mem verkas por la esperanta komunumo. Kaj interalie eĉ por tia ĝisostulo, kia estas la ĵus aludita Rikardo Ŝulco mem, kiu superŝutinte min per skoldoj kaj riproĉoj, tamen ne hezitis konfesi proksimume jenon: "Ho, kiom vi ĝin ĝuis, tiun romanon. Iam entuziasmigis vin Propercio, Tibulo, Katulo, Ovidio kaj eĉ Vergilio kaj Cicerono. Tiom facile vi englutis ilin, tiujn **ab, ak, aŭtem, enim, forsin, nam, olim, tum** kaj **tunk** [preskaŭ ĉiuj malnovaj konatoj ankoraŭ el antaŭ la unua mondmilito, K.P.]. Ili sonas hejmece al vi. Ili memorigas al vi la longajn feriajn tagojn, la horojn de feliĉo, kiujn vi pasigis super viaj amataj klasikuloj..."*

Ŝajnas, ke ĝuste ĉi tie kuŝas la kerno de la tuta problemo. Faka literaturo en naciaj lingvoj uzas ĉirkaŭ 100 000 fremdajn vortojn, kontraŭ kiuj neniuj protestas, se ili restas en la faka sfero, sed neniuj kuraĝas plibonigi la **kernon** de iu lingvo, uzatan de infanoj kaj ordinara popolo, precipe ne aldoni novajn **prepoziciojn, konjunkciojn, pronomojn kaj adverbojn**.

La **Fundamento de Esperanto** listigas 2600 vortradikojn, sed mankas tie ekzemple nomoj de nacioj, landoj kaj urboj. Sed kiam Zamenhof tradukadis Bibliion, li devis esperantigi nomojn de multaj nacioj, landoj, urboj kaj eĉ de bibliaj personoj. Do li uzis multajn novajn vortojn, kiuj ne troviĝas en la Fundamento, kaj tiel li montris, kiamaniere eblas la Fundamenton riĉigi. Ekzistas miloj da plantoj kaj animaloj, kiuj bezonas havi tradukon en Esperanto. Same ankaŭ terminoj medicinaj, teknikaj, arkitekturaj, ekonomiaj, religiaj, sportaj ktp. Ĉi tie ne estas problemoj.

Tikla afero estas, kiam iu volas enkonduki sinonimojn por adjektivoj de kvalito (**bela, granda, sata**) kaj ĉefe por iliaj mal-vortoj (**malbela, malgranda, malsata**), sed veran teruron vekas novaj sinonimoj por diversaj helpaj vortetoj (**nun, nur, ĉi tie, ĉar, ke, kiu, kie** ktp.). Ĉiu tuj demandas: ĉu iu kuraĝas tiamaniere "riĉigi" mian gepatran lingvon?

Aliflanke estas vero, ke Esperanto estas fremda lingvo kaj komence por novuloj ĉiuj vortoj estas fremdaj kaj nekutimaj. Se ili lernas samtempe **bela** kaj **ĉarma**, **gaja** kaj **ĝoja**, **afabla** kaj **agrabla**, ĉio estas por ili natura kaj normala. Se ili tuj lernas **longa** kaj **kurta**, **seka** kaj **humida**, **kruro** kaj **gambo**, **intima** kaj **gemuta**, **salti** kaj **hopi**, **eki** kaj **starti**, **permesi** kaj **prohibi**, **ĉagrena** kaj **trista**, ankaŭ tio estus por ili normala. Eble ankaŭ **pli** kaj **men**, **ĉar** kaj **nam**, eble kaj **forsan**, **iam** kaj **olim**, **sed** kaj **ma**, **bona** kaj **mava**, **bela** kaj **turpa** ktp estus akceptitaj normale, se ili estus instruataj dekomence. Eble la impresoj de nenormaleco kuŝas en la instrumetodo.

Kontraŭ novismoj oni ankaŭ argumentas per aziaj esperantistoj, kiuj laŭdire ne komprenas eŭropismojn kaj ne ŝatas ilin. Sed kiam mi legis la 600-paĝan ĉefverkon de la ĉina literaturo Ruĝdoma sonĝo, mi estis surprizita, kiel la ĉina tradukinto amis ĝuste tiajn vortojn: **avinjo bankedis ĝardene, li aŭdiencis Jadon, tie oldas templo, kvazaŭ montoj lavangus, magris rikolto, ĉiuj kromedzinoj sterilis, ŝvito eksudis** k.s.

Kompreneble, se ĉiu homo volus riĉigi la lingvon laŭ siaj preferoj, estiĝus galimatia konfuzo. Maljunaj homoj, kiuj lernis en la lernejo latinon, kutimiĝis al la latinaj vortoj kaj ĉar en Esperanto ili vidas idon de latino, eble ŝajnas al li nature enkonduki la intime konatajn vortojn en Esperanton. Sed nun la lernejoj lernas angle, do ili povus pro samaj motivoj enŝutadi anglaĵojn.

Konklude

La membroj de la Praga skolo iniciatis diskutadon pri tio, ke la internacian lingvon necesas evoluigadi kaj riĉigadi, sed ne sukcesis konvinki aliajn diskutantojn, ke ĝuste ilia vojo estas la ĝusta.

Malgraŭ la malsukceso de iliaj polemikaj eseoj, ili sukcesis riĉigi la Esperanto-literaturon per siaj poeziaj verkoj pri kiuj mi jam parolis.



René de Saussure

Neceso kaj sufiĉo



Ferdinand de Saussure

Kurso de ĝenerala lingvistiko

KOPENHAGA SKOLO

Luis Hjelmslev

PRAGA LINGVISTIKA CIRKLO

Vilém Matheius - Bohuslav Havránek
Nikolaj Trubeckoj - Roman Jakobson

BUDAPEŝTA SKOLO

Kalocsay - Baghy

SKOTA SKOLO

Auld - Dinwoodie - Francis - Rossetti

ILTIS-SKOLO

Haupenthal - De Diego - Pič

ANALIZA SKOLO

Ŝulco - Lutermano

Praga Skolo



Eli Urbanová
1922 - 2012



Josef Rumler
1922 - 1999



Jiří Karen
1920 - 2000



Čestmír Vidman
1921 - 2013

Eli Urbanová




Josef Rumler



Jiří Karen



Čestmír Vidman





Karolo Piĉ



«Du voĉoj»: Vladimír Leraus, František Kožík, Zdeňka Svabíková



Praha 26. 10. 1949 · Roĉ. IV · Ĉislo 8


ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX/7-7075. — Redaktas Dr. Stanislav Kasmáry.

Karolo Piĉ: Esperantaj neologismoj

Preĝejo ĉirkaŭ en la Sonora Kolegio de Esperanto en Dobruška en Julo 1949.



Karolo Piĉ
La Litomislá Tombejo



TABELO DE DIVERSAJ STILOJ EN ESPERANTO

Stilo kaj funkcio	dominanta stilo	lingva grupo	Esperanto (koncepto)	lingva grupo	lingva grupo	lingva grupo	lingva grupo	lingva grupo	lingva grupo	lingva grupo
1. komerca (uz) a) konversacia b) publicista	komunika	nesese kaj efektive	+	morfenemo (radiko, afikso, finajo)	sur se neceso	baza radikaro Plana (il. vortaro)	baza	+	plene validas	+
2. fanka a) j. praktika b) j. scienca	intelekta	koncize kaj precize	-	termino (vorto monolitaj, tutejaj neformetabla)	-	terminaro	sciencia-teknika	-	la dua rekomendaĵo de la 10. regulo	-
3. arĥitektura a) de pozicio b) de grupo ĥiccia c) de eseno	estatika	abande kaj redunde	+	klia aliaj partoj de la teksto estas aplikablaj kun- kaj dismutabla, inkluzive terminoj (dactive od. event. retrodirive)	-	decimilmojta teksto	eksplicite de ĉiuj afiksoj kaj ĥic plus plirigita	+	la dua parto de estas devliga	[tio ne ekvivalenta al terminoj en eseo ktp.]
komplemento al 3. b kaj retro al 1. a konversacia stilo ĥiccia							eksperimenta ekfunkcio de neologismoj			




Abunde kaj redunde

• pref. sen; ne (apollitika, abono, asimetria, anofra); ab prep. de, alde, de ĉe, ekde; abenco malbeeso; abasivi fini partoprenon, laboron; ad al; adaga lanta; serpario (flughavo); ak kaj ek; ak — ak kaj — kaj; ala suf. -a, rilata al, apartena al (regila); alibe aliluce; ala suf. kvazaŭ neperena, paralela de alio (arealo, finajo, serio, turno, tagalo, ilustrajo); auterario detrevo; antikia helena-romana; antikva malnova; antiŝi kontraŝi; antrope homo; opa taga, konvona; arvi vovi; armario skombo (ĥicloro); as estanti; atra suf. havanta mancon, simonico, kvazaŭ a (verdikta, doĥatra); atrakcio progresivo (artona ktp.); atrakiva allago; abgmentativa pilgrandiga, plimoliga; abkileto helpe; alitem sed, tamen, ja; alŝtopio 1. memviro, memsperto, 2. nekropsio; avonome vitiŝi ĉio, pretere

baji lali; balao, balnajo bano, banloko (termala); basel soti sufiĉe; bibi trinki; blira maldolĝa; blami diskrediti; blaza trosaltiga per guo; bliaki intermite (omi); bravara luvavejo; breva korta; buŝilo 1. forumajo, 2. vulvo; burgo 1. fortikigita kastelo, 2. urbeto subburgo; basino vulpo

caĝa blinda (figure); celibato, celibo senedzineco; centenario centjarĝo; cidi ekstermi, mortigi, likvidi; cuki rapide ekviri, skui; ĉiĉ intecj. por alivoki katinon; cido 1. katinio, 2. vulvo

d de; darfi povi, licit; deala detempaltempo; de dopo de malanta; deinde poste, ab ĉi tie, sekve; dekada 1. jardeko, 2. triono de monato; demoli malkonstrui; de pre de antaŝi; deŝio devala veikarado; despekte malrespekto, maldejo; desperi malseper; dificila malfacila, komplika; dikcio esprimmaniero, stilo; diaj maldeja; dirta malpura; dokao opinio, koncepto, kredo; domestika malsovaĝa, hejma; domini superregi, superpotenci; dopa dorsa, posta, malantaŝa; dopajo postajo; dos de sur; draga speciala vosto (postlabora, postporta, postbatala, batal-dreco, ĉamplondreco); darsti sotti; decaulo dekjarĝo, jardeko



DEBATO PRI LA «PRAGA SKOLO»

URBI ET ORBI